Arto estas grandioza kaj fortega ilo de eksciado, ĝi probable plej efektive utilas la potencon de nia malkonscio kaj intuicio. Tial mi verkas kaj ludas: por eksciі kaj ekkoni; ne por prezenti vidpunktojn, pensojn au sentojn, ne por atingi ian efekton mistikan au estetikan, ne por krei ian situacion, por iun influi, senvoligi au sorĉi, sed por daŭrigi la spiritan trejnadon.

Tamen, ne nur tial, sed antau ĉio por n e k o n s c i e e k s c i i kia estas la mondo en mi kaj ĉirkau mi, kial ĝi estas tia, kial mi estas kaj kial mi estas ĝuste tia. Kaj tiam verkaĵo aperas kvazau hazardeŝance, samkiel la piedoj de vojaĝanto levas polvonubojn iufoje. Verkaĵo estas kvazau raporto je tiu eksciado, ĉu la rezulto plaĉas al mi au ne. Ne eblas fuĝi antau eksciado, kvankam plimulto kondutas ĝuste tiel, ĉar "ju pli ni scias, des pli ni suferas", kio ĝuste ravigas nin nekompareble pli multe.

*Werner Heisenberg*, unu jaro post kiam li ricevis la Nobelan Premion, kiam li hejmiĝis en eta loĝejo en la lasta etaĝo de Fizika Instituto en Lepsiko, aĉetis fortepianon kaj konsideris ĝin kiel la plej gravan meblon. Ofte li vespere ludadis je ĝi ĉambromuzikon sole au kun amikoj. Li eĉ prenis lecionojn en la konservatorio, kaj kiam li komencis prepari koncerton a-minoran de *Schubert*, li ripetadis ankau inter la lekcioj. Eble tiu flirto dauranta ekde la juneco kun l'arto, kun la sfero, kie la parto povas enhavi la tuton kaj la tuto ne havas partojn, ebligis ekkoni kvantumojn, principon de nedeterminebleco kaj de aliaj bizaraĵoj.

Kaj kion mi ekkonos? Pri kio mi ekscios? Kion mi jam ekkonis? Pri kio mi jam eksciis? Kia estus mia magia kvadrato? Sendube nekompleta mankis al ĝi iu angulo au latero, ĉar daure kaj ĉiam mi volas eksciі ion, daure kaj ĉiam mi ekscias ion novan. Mi ne perceptas la mondon kiel sistemon fermitan, kiun oni povus dismunti en kelkajn komunmezajn kvadratojn - certe estas nur: mi scias tro malmulte.

Adreso de la autoro:
Radoslaw Nowakowski
Dabrowa Dolna 41
PL 26-010 Bodzentyn



*Recenzo*

## *INTERNATIONALE REVUE 17*, 1996

Ĉe ĉi tiu publikaĵo temas pri la *Zentralorgan der Internationalen Kommunistischen Strömung (IKS)*, 'Internacia Komunisma Tendenco', kiu estis fondita 1975 kiel internacia organizo. Sekcioj de IKS ekzistas en diversaj landoj, kies nombrado troviĝas je la fino de la recenzo.

Kajero n-ro 1 de la *Internationale Revue* aperis en aprilo 1978, la sekvantaj numeroj en malregulaj intervaloj.

Hodiau estas necese, en la tempo de la disfalo de kontrauaj blokoj, ekkapti temojn, socie kaj politike gravaj, kaj pritrakti ilin lau principaj tezoj reprezentante tiel precizajn starpunktojn. Tio estas la kazo en ĉi tiu organo.

IKS reprezentiĝas esenca kaj konsekvenca defendanto de la proleta revolucio. Post la disfalo de la t.n. komunisma orienta bloko kaj de la t.n. reale ekzistanta socialismo estas tia pozicio de ekzempla intereso, ĉar ĝi troviĝas fakte en kontrasto al ĉiuj ekzistantaj politikaj partioj de ĉiuj tendenco, kaj antau ĉio ĝi fundamentiĝas esprime sur la proleta medio en la senco de la marksismo.

Decide estas sia akra limigo kaj kontrau ĉiuj t.n. maldekstraj oportunismaj frakcioj de la kapitalo (antau ĉio la sindikatoj) kaj kontrau ĉiuj iaj t.n. ultramaldekstraj, anarkiaj au terorismaj 'cirkloj'.

En siaj analizoj emfazas IKS la akriĝantan krizon de la kapitalismo surbaze de ĝia historia evoluo (antau ĉio la aktuala konsumisma superproduktado) - krizo, kiu eĉ pligrandiĝas post la malapero de la ŝajna, sed fakte ŝtatkapitalisma ĉefrivalo. La kontraudiroj de la kapitalisma sistemo nun ne plu povas esti projekciataj sur ŝajna ekstera malamiko, sed ili pliakrigas la internajn streĉojn inter la variaj frakcioj de la mondreganta kapitalisma bloko.

La interesokontrastoj en la burĝa klaso kondukas nun ne plu al anstataŭulo-militoj inter la du ĝismortaj sed fakte "frataj" malamikegoj, sed al imperialismaj konfrontadoj de ĉiu kontrau ĉiun. Tio okazas en klimato de mondvaste kreskantaj nacionalismaj tendencoj.

La historiaj radikoj de IKS estas klare nomitaj: estas la atingaĵoj de la Alianco de la Komunistoj (1847-52) (*Bund der Kommunisten*) kun Karl Marx kaj Friedrich Engels, de la I-a Internacio (1864-72) (*Internationale Arbeiterassoziation, IAA*), de la II-a Socialisma Internacio (1889-1914) kaj de la Komunisma Internacio (1919-28); krom tio enfluas la IKS la spertoj de la germanaj, nederlandaj kaj italaj maldekstraj komunismaj frakcioj de la III-a Internacio en la 1920-aj kaj 30-aj jaroj.

Internaciaj publikaĵoj:

| | |
|---|---|
| Germanio | Internationale Revue |
| | Postfach 410308, DE-50863, Köln |
| Hispanio | Accion Proletaria |
| | Apartado de Correos 258, Valencia |
| Venezuelo | Internacionalismo |
| | Apartado 20764, Caracas 1020-A |
| Italio | Rivoluzione Internazionale |
| | CP 469, IT-80100 Napoli |
| Belgio | Internationalisme |
| | BP 1134, BC1 1, BE-1000 Bruxelles |
| Svedio | Internationell Revolution |
| | IR Box 21106, SE-10031 Stockholm |
| Nederlando | Wereld Revolutie |
| | Postbus 11549, NL-1001 GM Amsterdam |
| Usono | Internationalisme |
| | PO Box 288, New York, N.Y., 10018-0288 |
| Francio | Revolution Internationale |
| | RI, BP 581, Cedex 1, FR-75027 Paris |
| Britio | World Revolution |
| | BM 869, GB-London WC 1 N 3 XX |
| Meksiko | Revolucion Mundial |
| | Apdo Post. 15-024, C.P. 02600, D.F. Mexico |
| Hinda Unio | Communist Internationalist |
| | PO Box 25, NIT, Faridabad, 12001, Haryana |



**Postrimarko pri grava sesdekjara datreveno.**

Koŝmara ŝlosila sperto de la proletara batalo estis la eventaĵoj dum la hispana intercivitana milito (1936-38). Politike konsciaj partoj de la laboristaro ekkonas hodiau, sesdek jaroj post la komenco de jena murdiga batalado, pli klare la frontojn, kiuj jam tiam, flanke de la progresivaj organoj de la tiama maldekstrularo, estis ĝuste analizitaj. Temas ekz. pri BILAN (n-ro 34, aug.-sept. 1936), eldonita de la itala maldekstro eksterlande, kiu denuncis la kontraufaŝistan lukton de la burĝona demokratio, slogane nomita "popolfronto", kiel antaŭŝtupo de la imperialisma milito - ĉar ĝi ne konsekvence celis la detruon de la kapitalisma ŝtato, sed ties "uzado" flanke de la laborista klaso.

La burĝona ŝtato, regata de la respublikaj partioj en popolfronta alianco kun certaj anarkia-sindikalismaj tendencoj, establis nome de la antifaŝisma lukto imperialisman fronton, kiu neklektis kaj perfidis la originajn esencajn celojn de la klasbatalo, en kiu troviĝas la hispana proletaro.

Hodiau estas pli facile ekkoni, ke la laboristaj amasoj lasis peli sin en tiun antifaŝistan sakstraton anstatau rigore alstrebi la proprajn klaspostulojn, nome la detruon de la ekspluato-ŝtato, kiu nomis sin respublikana.

Analize montriĝas baza kontraudiro inter detaloj kaj fundamentaĵoj, inter la ofereco de la laboristoj, aliancigitaj en la popolfronto, kaj la historia politika funkcio de tia popolfronto. Tiu disviŝado inter taktikaj kaj principaj pozicioj regadis la diskutojn en la hispana intercivila milito, kiu estiĝis la lasta decida provo por la dua mondmilito kaj ĝia imperialismaj tendencoj.

La armita lukto de la laboristoj enkadre la kontraufaŝistaj internaciaj brigadoj estiĝis fatalo, ĉar la popolfronto mem estiĝis - far de la stalinista subversio - parto de imperialisma fronto. La hispana komunisma partio estis dekomence destinita per la influo de la stalinismaj centristoj; sub la preteksto de trockisma devio ili frakasis la proletarajn ribelojn en Barcelona (1937) kaj samtempe likvidigis la ege malamatan antistalinisman POUM (laborista partio de unuiĝo marksisma), kvankam tiu ĉi paktis kun la popolfronto. La perfido de la

stalinistoj rilate al la proletara ideo estiĝis tragika katastrofo por la proletario sur la tuta mondo.

La esperantlingva organo "Popola Fronto", kiu havis nur sensignifan rolon enkadre la brigadoj, subtenis la intencon de la komunistoj, kiuj vidis en la proletara revolucio je la tiama momento la endanĝerigon de la prioritata celo, nome la milita venko de la popolfronto (vd. Ulrich Lins, "Esperantistoj en la Hispana Intercivitana Milito", p. 79 en "Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado", Fritz-Hüser-Institut, Dortmund, 1993).

"Popola Fronto" konsekvence reagis kolere al artikolo en "Sennacieca Revuo" (Januaro 1938), kiu finis artikolon per la slogano "Por venki *Franco* necesas venki *Stalin*" (loc.cit. p. 80). Nur, ankau tiu slogano ne faras klare ekkonebla la proletaran revolucion kiel la esencan celon de la internacia proletaro.

La hispana intercivitana milito alprenis sub la batalkrio "Socialismo au Faŝismo" la karakteron de internacia imperialisma milito, el kiu rezultis la regado de la burĝa klaso, kiu estis plifortigita pri jardekoj dank' al disviŝo kaj maskado de la decidaj distingendaj frontoj, dum ke la proletario estis ne nur trompita pri la oferoj de sia revolucia lukto, sed ankau profunde frustigita.

El tio rezultas la ekkono, ke la 'la lukto por libereco kaj demokratio' enkadre de imperialismaj implikiĝoj nur povas esti mistifika trompigo kun la celo, deturni la proletaron for de ĝia klasinteresoj.

Ĝuste el la spertoj de historiaj eventoj eltiras IKS la ekkonon, ke tro antautempa agado sen bazaj analizoj de la historia konekso devas konduki al katastrofaj konsekvencoj. Agademo nek povas nek rajtas esti kompensado pri la klaskonscia ekkono, fari en ĝusta momento adekvatan trafon.

Fontoj:
*Bilan*, n-ro 13, Dec. 1934.
*Octobre, Monatszeitung des Internationalen Büros der Fraktionen der Kommunistischen Linken*, n-ro 3, Apr. 1938.

(rh)



# Tutmondaj Scienco kaj Tekniko

1996
3
(45)

Ĉefadministrata de Ĉina Akademio de Sciencoj
Aŭspiciata de Instituto de Sciencteknika Politiko kaj Administra Scienco en ĈAS
Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio de ĈAS
Kunlaborata de Grup-Korporacio Languang de Yangzhou
Eldonata de Eldonejo Tutmondaj Scienco kaj Tekniko
Direktoro de eldonejo TSkT: Xu Weixuan
Ĉefredaktoro: Shen Chengru
Vic-direktoro: Wang Yuchun, Lan Dun-hua
Vicĉefredaktoro: Shen Aiqun
Ĝenerala redaktoro: Zheng Yi
Vic-ĝenerala redaktoro: Li Xingrong
Adreso de Eldonejo: Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio
Fakso: 0086—10—68512458
Presita de Fremdlingva Presejo
Eldonita de Septembro 1996
Prezo: USD 16 jare por 4 numeroj
Reklamo-licenco: Jingxigongshang guangzi n-ro 0082
N-ro de revuo: ISSN 1003-1898 / CN 11-1733/N

# ENHAVO

**· SCIENCA FORUMO ·**
Disvolvi altan teknikon estas fundamenta vojo por solvi mankon de monda riĉfonto ........ (5)
**· ĈINIO KUN FLUGILOJ DE SCIENCO KAJ TEKNIKO ·**
Ekonomia spino de suda Hebei-provinco en la 21-a jarcento (Yang Yuankui kaj Wang Yanqing) ........ (9)
La prospera familio de ceramikajoj (Zhao Hongsheng) ... (13)
**· GLOBAJ SCIENCO KAJ TEKNIKO ·**
Dek novjarcentaj superinĝenierajoj tra la tuta terglobo ... (16)
La turo de Pisa ........ (18)
**· '96 Internacia Esperanta Somera Semajno por Geknaboj kaj Gejunuloj ·**
Floroj de Esperanto Prosperas en Pekino (Li Yuping) ... (21)
Al amikaj anĝeloj (Shi Chengtai) ........ (23)
Salutparolo de Marie-France ........ (24)
**· PROGRESO DE SCIENCO KAJ EDUKO ·**
Homo posedas sep ekspluatindajn intelektojn ........ (27)
Homo posedas ses denaskajn talentojn ........ (29)
**· KRESTOMATIO ·**
Ni savu la tibetan praarbaron kaj la aziajn riveregojn (Manfred Westermayer kaj Christian Lavarenne, Germanio) ........ (32)
**· KURACADO KAJ SANPROTEKTADO ·**
Pri kuracado de miopeco per orelakupunkturo (Li Chaoyang) ........ (36)
Oksigenodona metabola sporto (Jiao Qiang) ........ (38)
Scienca utiligo de akvo por preventi kanceron (Cai Zuhuang) ........ (40)
Tomato povas preventi prostatan kanceron, Larvo povas akceli cikatriĝon, Multe trinki bruan teon por preventi apopleksion ........ (41)
**· LETERKESTO ·**
Letero el René Fiorese, Francio ........ (45)
**· TERMINARO ·**
Laŭtema vortaro Esp-Angla-Ĉina ........ (46)

La kovrila foto: Espero (ĉinstila pentrajo, por renkonti la 5-an I-AKSTE) ........ pentrita de Chen Tieqiao